

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

№ 11


Novembro, 2014

Kara Leganto, bonan vesperon. Mi scias, ke multoj de vi legas nian mond-faman ekdonaĵon vespere, ĉirkaŭante viajn gambojn per varma kovrilo. Almenaŭ al tio puŝigis vin (kaj nin) la hodiaŭa mez-novembra vetero. Estu korpe varmaj kaj malvarmaj cerbe!

Ĉi numero estas plejparte preparita de niaj membroj kaj dediĉita al okazintaĵoj apudaj. Do, la plej grava aranĝo estos, sendube, la Zamenhofa Tago. Ne forgesu registriĝi kun nia kasisto Karlo Gunn, sendante al li \$20 por la partopreno kaj ankaŭ membro-kotizon por la sekvanta 2015 jaro.

Vi trovos ankaŭ interesajn novaĵojn el E-libra mondo, ankoraŭ unun interpreton el populara kantaro fare de senlaca Gregoro Dolgin. Agrablan legadon!

–La Redakcio.



Gregoro S. Dolgin (12.20.1934 – 11.21.2014)



Kun granda malĝojo mi informas, ke jam ĉesis bati la senlaca koro de nia verva Samideano, E-poeto kaj komponisto, multjara membro de nia E-societo, s-ro Gregoro Dolgin. Kara Gregoro, ripozu Vi en paco!

Jen estas lia (ne) lasta kontribuo al nia bulteno:

Historio de l' amo

“Kancero povas mortigi vivon, sed ne amon”

El observo de Gregoro S. Dolgin “Kinoekrano kaj Amo” (gazeto “Chicago Review”, # 20, Majo 2009). Ĉi tie li proponas la kurtigitan esprimon en Esperanto.

“Love Story” (Rakonto pri amo), Usono, 1970, Bostono, Masaĉuseco, Harvarda Universitato. Amo inter gestudentoj Oliver kaj Ĝenni estas fenomeno de l' mensa kaj fizika harmonio. Kie regas reciproka amo, tie sekvas nupto, ĉi kaze – modesta nupto... Ĝenni ekmalsanis. Diagnozo: leŭkemio. Oliver daŭrigas la studadon kaj laboras. En hospitalo. Lasta horo de l' amatino. Superigante doloron kaj la konscian nebulon, Ĝenni ekridetis, por ke la amato ne vidu ŝiajn suferojn. Kaj lasta “sorry!” (pardonu). *“Love means never having to say you're sorry”* (Amo neniam devas pardonpeti). Amo por ĉiam, poreterne. Jen estas sentenco de la filmo. Olivero sidas sur oceanbordo kaj rememoras ĉiun tagon, ĉiun minuton de sia feliĉo. Sonas genia muziko de Frensis Lej, liriko de Carl Sigman (1969).

P. S. Pasis jam 44 jaroj. Laŭ vasta enketado filmo “Love Story” restas plej sukcesa, plej viviĝa kaj kortuŝa el ĉiuj filmoj de la homaro. Al muziko de tiu ĉi filmo kaj samnoma kanto “Love Story” de Frensis Lej oni atribuis prestiĝan Oskar-premion. “Love Story” interpretis el la angla de Gregoro S. Dolgin, Majo, 2014.

Kion diri nun,
Komenci kiel historion de la am'? –
Ja tiel granda, tiel dolĉa estas ĝi,
Senvelka amo!

Neniu ŝin anstataŭigi povas, kaj
Neniam estas mi postfine en solec'.
Radias varmon ŝiaj fingroj, kvankam ŝi
Ne plu revenos.

Kion diri nun,
Se ekde la unua sorĉistin-rigard'
Ŝi inspiradis tutan mondon ĉirkaŭ ni
Per senc' magia.

Belegaj kantoj ŝiaj sonas ankaŭ nun
Al ili ĉiam resonancas mia kor'.
Animon mian troplenigas ŝia am' –
Ĝi flugiligas!

Mi bezonos ŝin
Ĝis kiam steloj lumos en la Lakta Voj'.
En ties lumo mi esperas trovi ŝin,
Esperas trovi!

«Love Story» – ĉi vorta paro sonas en la angla
sufiĉe bone. Tamen rekte tradukita en E-to kaj,
ekzemple, en la rusa, tio subigus altan sencon
de l' verko. Preferindas: «Historio de l' amo».



El Nia Librobreto

1. Atingis nin la plej nova esperanta libro de *Roman Dobrzynski* – “**Rakontoj el Oomoto**”. Ĝi estas vere enhave riĉa enciklopedia minejo de la informoj pri la komplika japana religia situacio, verkita fare de la eksterulo. Temas ĉefe pri la religio Oomoto, kiun la aŭtoro nomas ekzemplo de la praktika aplikado de Esperanto. Oomoto uzas la Internacian Lingvon kiel propran liturgian ilon kaj ankaŭ kiel ponton por atingi la eksteran mondon. Oomoto famas tutmonde pro ĝia devizo: “*Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo*”. La libro abundas je la historiaj kaj nuntempaj rakontoj, nenecese ordigitaj laŭ kronologio. Ĝin akompanas kolora surdiskigita filmo “*Japana Printempo Oomoto*”, riĉa je muziko kaj belaj bildoj pri la japana kulturo spertita de s-no Dobrzynski kiel lerta televida raportisto dum liaj pluraj longtempaj vizitoj en la Lando de Ĉerizfloroj. Ankaŭ helpas detala indekso, sed mankas mapoj de la malmulte konataj lokoj, priskribataj en la libro. Forte rekomendinda legaĵo!

–*Les Kordylewski*

2. La plejmulto de aŭtoroj en la mondo verkas en unu lingvo, kelkaj eĉ kapablas prozi kaj poezii en du lingvoj. Trilingve laborantaj verkistoj ne estas multaj, sed ĵus unu tia estis premiita en Finnlando. La premio “Kanava” por la plej bona nefikcia verko de la jaro estis aljuĝita al la ĵurnalisto *Kalle Kniivilä* pro lia libro “Putinin vakeä”, jam aperinta en Esperanto. La verko, kies temo estas efektive aktuala pro la politika situacio de Rusujo kaj pro ties streĉitaj internaciaj rilatoj, aperis en rapida sinsekvo en tri lingvoj: unue en la sveda kun la titolo “Putins folk”, poste venis la Esperanta versio “**Homoj de Putin**”, kaj baldaŭ ankaŭ la finna versio nun premiita. Kniivilä mem verkis ĉiujn tri eldonojn, kiuj estas enhave similaj. Li nur iomete adaptis la tekston de la finna versio prezentante en ĝi komparojn kun Finnlando, ne kun Svedujo.

En la centro de la verko de Kniivilä ne estas la politikaj gvidantoj de

Rusujo aŭ ties opinioj. Li priskribas la pensojn de ordinaraj civitanoj, serĉante tie la faktorojn malantaŭ la populareco de la landestro. Li trovas en la lando plimulton, al kiu plaĉas la stabileco, la ekonomia kresko kaj la restarigo de la antaŭa superpotenco. La prezidanto de la premiinta ĵurio diris, ke la verko klare sed senpasie malkaŝas, kie troviĝas la subtenanta bazo de Putin. La libro estis tre favore recenzata kaj en Svedujo kaj en Finnlando. Ĝi vekis certe pli grandan interesiĝon en Finnlando pro la situo de la lando en la monda geografio. Kniivilä mem diras en ĵusa intervjuo: “Nun, kiam Rusujo komencis aparte memori pri sia ekzisto, oni parolas ankaŭ en Svedujo pri aferoj de Rusujo. Sed antaŭ kelkaj jaroj tio apenaŭ okazis.”

Fine de la verko la aŭtoro dankas ankaŭ esperantistajn amikojn kaj kolegojn, kiuj helpis realigi la verkon, precipe dum li serĉis la ordinarajn homojn, kies opiniojn kaj spertojn li volis aŭdi. –*El Libera Folio*

3. En la printempa numero de la novjorka “**Beletra Almanako**” (n-ro 19) aperis artikolo de la vicprezidinto de nia E-societo kaj redaktoro de “Saluton!” Viktoro P. Temas denove pri la ukraina Majdano – placo de la multmilaj, milionaj protestoj kontraŭ la reĝimo de Janukoviĉ pro la homrajtoj. Kelkaj eks-teamanoj de la satira teatro “He журись” (*ukr.* Ne enuu) denove unuiĝis kaj ekverkis por la protestoj en Ukrainio pro la kuniĝo kun la Eŭropa Unio”. Inter ili – poetoj Jurij (Georgo) Vinniĉuk, Andrij (Andreo) Panĉišin, gitaristo-plenuminto (mia kolego – tradukisto kaj samnomulo) Viktoro Morozov. Preskaŭ ĉiutage aperis 1-2 kantoj por la subteno de la protestantoj (kiam ili estis porpacaj). En la revuo aperis sep tradukoj de-sub plumo de la renoma tradukisto Kris Long (Britio). 1-2 tradukoj jam aperis sur la paĝoj de la “Salutom!”. Renovigu ilin en via memoro, se eblas?..

Ne hezitu aboni la menciitan revuon kun la plej bonaj verkoj de E-prozo, poezio. Sendu ĝin al viaj E-amikoj. Agu tuj! –*Araneo*

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O’Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

Cobbler Square Loft Apts.
1350 N. Wells St., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t.

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

25an de Novembro – Humberto Perez:
“Via sano – per Energia Terapio”
La Adreso: Cobbler Square Loft Apts., 1350 N. Wells St., Chicago

14an de Decembro – Zamenhof Tago
12–4 p.t. \$20. **La Adreso:** MDA Konstruaĵo, 63 E. Lake Ave, 24-a Etaĝo, Chicago

27an de Januaro – Temo estos anoncata.
La Adreso: Cobbler Square Loft Apts., 1350 N. Wells St., Chicago

